



nur pecojn



esperanta poemaro
tradukita kaj originala

belmonto

Poemeto

Ŝimazaki tooson

Ni ne povas ja elĉerpi
Freŝan akvon el la font'
Mi komencu kun vi ĉerpi
tion nune ĉe la font'

Ne sekecon konas vere
freŝa akvo de la font'
Kun vi trinku mi prefere
tion kune ĉe la font'

Estu mi la akvo freŝa
eliĝanta de la font'
En printempa kor' karesa
elŝprucadu mi de l' font'

Estu mi la akvo freŝa
eliĝanta de la font'
Mi kun vi en flu' senĉesa
fluu sub flor' kun rakont'

*(jp)Simazaki tôson: 1872 - 1944

* "Syôsi" el "Wakana-syû"(1897)

diversaj sentimentoj ĉe scenetoj

Murou saisei

I

Solecas la blanka fiŝo!
Kiel obeemaj,
kiel modestaj la pupiloj nigraj!
kiuj vidas min senemocian
kampe manĝantan
kun malĝojo...
Mi ne volas paseraron aŭdi ĝojpipantan!

II

Hejmo estas de lontano sopirinda,
ja kantinda kun malĝojo!
Se mi
malprosperus, almozpetus fremdatere,
tion ne indas por reveno!
Mi solstaras megalopole
kaj ĝislarmas por la hejmo...
Tiukore
mi revenu lontanurbon!
mi revenu lontanurbon!

III

Kormalĝojo al perdita
La horloĝo el arĝento...

Super fluo fluperdita

Pontapoga plorlamento...

IV

eliriĝas verdo

el animo mia;

en senfaro

elŝprucadas larmo penta;

en fosado

elŝprucadas larmo p e n t a ...

* Murou seisei: 1889 - 1962

* "Syôkei Izyô" el "Zyozyô Syôkyoku-syû"(1918)

Soleca Printempo

Murou saisei

Guti êesas ne sunlumo,
Dorme bruas akvorado.
Bluêiele
Sin vidigas mont' d' Eêigo!
Mi solecas.

Tutan tagon sen vortumo
En kamparo --- promenado.
Kolzaj floroj
Ondas vaste malproksime;
Vere nune
Mi solocas.

*(jp)Etigo: la malnova nomo de la nord-orienta gubernio.

* "Sabisiki Haru" el "Zyozyô Syôkyoku-syû"(1918)

* la raduko unue aperis en "La Unua Paŝo" n-ro 14, 1973.

Naiva Harpo

Jagi ĝuukiĉi

Se mi metos en ĉi helecon
Solan naivan harpon,
Subtile ĝi komencos vibrigi la korpon,
Sebteni ne povinte aŭtunan belecon.

*(jp)Yagi Zyŭkiti: 1898 - 1927

* "Sobokuna Koto" el "Aki no Hitomi"(1925)

* la traduko unue aperis en "La Unua Paŝo" n-ro 14, 1973.

Larmo

Mijoŝi tacuĵi

Iumatene, kiel verŝiĝas pluvo hieraŭnokta
de centro de floro

eta ulo
ho, eta ulo

tiel de via okularo, de inter via okulhararo
ĉi matene, de via eta malĝojo

en manon de patro
gute falanta

ĵus varma dum momentoj sur mano de patro
ho kio, kio estas tio?

Tio malsekigas manon de la patro
tio malsekigas koron de la patro

Tio elde lontana lando
tio elde lontana maro

elde nebula hejmloko de prapatro
de patro de ĉi tiu mizera patro

kun kanto de birdoj, kun odoro de floroj, kun blua ĉielo
kun montoj kaj riveroj senĉese ligitaj

--- 'stas venta saluto
memorplena saluto de la sezono

ĉi matene ĉi patron
nove atinginta la sciigo.

* (jp)Miyosi tatuzi: 1900 - 1964

* "Namida" el "Kusa-Senri"(1939)

LULĈARO

Mijoŝi tacuĵi

Patrino ---

Io falas pal-korŝira

Io falas hortensia

en ombro de aleo senlima

blovas vento brususura

Temp' vesperiĝas

Patrino Puŝu mian lulĉaron

Al la suno larmoplena

knare puŝu mian lulĉaron

Veluran ĉapon kun ruĝa kvasto

vestigu ĝis mian frunton kaltan

Ankaŭ ĉe vojaĝrapida birdovico

sezono penetras ĉielon

Vojo kie falas io pal-korŝira

falas io hortensia

Patrino Mi konas

ke ĉi voj' estas longa longa senfina voj'

* "Ubaguruma" el "Sokuryô-sen"(1930)

neĝo

Mijoŝi tacuĵi

dorm' al petro; sur tegment' tavolas neĝo.

dorm' al karlo; sur tegment' tavolas neĝo.

* "Yuki" el "Sokuryô-sen"(1930)

eĥo

Mijoŝi tacuĵi

malhelo de vespero kovris la ĉirkaŭon, kaj pendis super horizonto bluaj nuboj la similaj mondatlason. en herbejo vento nur al foliar' blovadis, kie li en alta voĉo al patrin' vokadis.

sur stratoj oni ridis portretecon al partin' la lian. kiun direkton iris ŝi post singoj paŝpunktitaj, kun la dors' kurba fiŝhoke? sur vojo pala, silueta en vesper', al ties malproksimo li en alta voĉo al partin' vokadis.

tio, kio atingis en trankvil' l' orelojn, estis voĉo lia, eĥo kria? aŭ malproksima voĉ' patrina, sian panjon krivokanta?

malhelo de vespero kovris la ĉirkaŭon, kaj pendis super horizonto bluaj nuboj.

* "Kodama" el "Sokuryô-sen"(1930)

Sur pavimŝtonoj

Mijoŝi tacuĵi

Bele, petaloj fluas
sur fraŭlinojn petaloj fluas
fraŭlinoj babilmarŝas kvietaj
klaraj piedsonoj ĉielen fluas
ili okulas al ŝanĝoj sezonetaj
kaj paŝas en templa printemp' senombra
Ĉar templa la tegolar' riĉas verda
kaj ĉe markez' kaj markez'
pendas tintiloj en trankvilec'
mi perda
paŝigas l' ombron mian sur pavimŝtonoj

* "Isi no Ue" el "Sokuryô-sen"(1930)

* petalo - tiu de ĉerizarbo. la simpla vorto "hana"(floro) tre ofte signifas ĉerizpetalon tradicie en
janano.

* la bela traduko far Ŝibajama Ĝun-iĉi(jp: Sibayama Zyun-iti) aperis en "La Revuo
Orienta"(JEI) antaŭ kelkaj jaroj. alia versio far 'Kano hamako' troviĝas en "La Unua Paŝo" n-ro
4.

al kamaradoj

belmonto

Forte, forte, forte, krii esperantoj!
ĝoje, ĝoje, ĝoje, marŝu kamaradoj!

En flamoj de amaso grandan celon trafu ni;
estonteco dependas de la ronda harmoni'.

Laŭte, laŭte, laŭte, krii esperantoj!
Gaje, gaje, gaje, marŝu kamaradoj!

Ni ĉiuj havas Esperanton en laborplena man',
sed tiel decidite ni movadas, ne por van'!

Forgesu ni neniam pioniraron for,
de ĝi ĉerpu instruaron kun lament', dolor'!

Denove semas ni la novajn sur patrolanda ter',
krede bonestontecon, historie nepra afer'.

Lumiĝas ja mateno, viŝiĝas nokta plor',
kaj ni kuras plu antaŭen, gloras ĝin el kor'.

Forte, forte, forte, krii esperantoj!
ĝoje, ĝoje, ĝoje, marŝu kamaradoj!

Floreagos Esperanto al la harmonia mond';
estonteco dependas de konstanta freŝa font'.

la preludo

belmonto

ondad', ondad', ondad'...

blovad', blovad', blovad'...

stelbril', stelbril, stelbril'...

trankvil', trankvil', trankvil'...

ardas plasmstel',

bruas nigrĉiel'...

tondr', tondr', tondr'...

akvo surfaca tre rapidas,

akv' abisma malrapidas.

ĉiel ludas ŝton' en tempo

en perdiĝo de la tempo

fundament' ĉe monda kreo

finŝanĝiĝos ĉe pereco;

tiutempe la rivero

levas sin, ho, al ĉielo.

vagabondas galaksie

ĝis haven' d' eterna verso.

estas hejmo mia kie,

en vasteg' de l' universo?

drinko

belmonto

kial larmo tiam fluas
kiam amon mi ne ĝuas?

tuj pasion de mi preni
kio povus ol ŝi veni?

ĝuu vin je vino bona!
nun ne venu fino voma!

poetaĉo

belmonto

se mi estus korpura,
se mi povus aŭdi al vento susura,
mi kantus belan kanton!

se elirus de mi bela kanto,
mi al korsopiranto
ĝin dediĉus.

jam

jam

belmonte

l' amata horo,

cio

--- jam en memoro...

kun vi

belmonto

varmas vento sub la arbo,
pipas birdoj sur la kampo.
brak' en brako kun la korbo
ni promenis en la tempo.

ha, pasintaj tagoj foraj,
min revenu tagoj oraj.

ĉio verdas en monteto,
brilas fiŝoj laŭ rivero.
man' en mano kun floreto
ni vadadis en espero.

ha, pasintaj tagoj foraj,
min revenu tagoj oraj.

larmo

belmonto

larmo fluas
el mia okular'.

larmo trovas en fluado
rememoron en la kor':
forpasintaj hejmo, l' amikar',
kanto de birdoj, la fratin'.

larmo fluas
al mia pasintar'.
fontante min
penetras rememorar'.

bela kanto

belmonto

mi rakontos pri ĉi temo,
junknabin', 'stas bela kanto.
sane sur genu' jen kuŝi!

maro vastis, malproksima
ŝipo iris al ter' transa
tondron, ŝtormon, baron ĝoju
mondon novan por malfermi.

morto ĝin atakis ĉasa
tombon prete, sed de ĉiu
ŝipistara bravo ŝirmi
marŝas pionir', sen famo.

satan, ja harditan sorto
juĝos vin, do, ĉesu marŝi!
miron portis vi sentima!

Rekviemo
- al masako -

belmonto

vi pasinta el komuna
tero --- dolĉaj horoj fore
en obstina marŝo kuna
grimpi ni intencis adore

altan supron de la kredo.
sana vi jen kuŝis fale
malsanejon jam en tedo
eĉ kun rid' al Dio pale.

mi perfidvaganta sola
sentas honton al vi brava.
restos en mi kio grava,

kiam marŝas mi senkora,
se mi venkos baron grandan,
se mi vivos vivon dandan?

Iulkanto de Amagi

belmonto

Super la mont' korvoj forflugas
serĉante nestojn por sonĝi si mem
Do, endormiĝu tuj, grandiĝu, o-lo-lom-baj

Vidante ondojn de la maro
brili ruĝe, arĝente,
Do, endormiĝu tuj, grandiĝu, o-lo-lom-baj.

Tans la montar' --- oni diras ---
ruĝa provinc' ekzistas por ni.
Do, endormiĝu tuj, fortiĝu, o-lo-lom-baj

Kiam vi kreskos jam plenplene
iru brave kun la volo mia!
Do, endormiĝu tuj, fortiĝu, o-lo-lom-baj.

* versita en 1968 aŭ '69.